

V-19449

old

Bulgara ESPERANTISTO





La Esperanto-klaso de Raina Stančeva en elementa lernejo „Kiril i Metodi“, u. Preslav



Restoracio „Esperanto“ en la fama apudmara ripozloko „Slančev Brjag“: supre — eksteraĵo, malsupre — interno (vd. p. 9).



ENHAVO

* Miliarda voĉo de la virinoj . . .	1
* CK de BEA protestas kontraŭ la faŝisma teroro en Hispanio . . .	2
Penju Stojanov. Panjo	3
Penka Papazova. Trakio	3
Asen Linov. Masonistoj	3
Rajna Arnaudova. Nia asocia kancelario	3
Ĥrima. Sango sur la verda stelo . . .	4
Maria Dičeva. Amikoj de Esperanto, amikoj de la montaro	7
R. A., M. Ĉ. La Internacia Esperanto-Ferio en Velingrad	8
* * * Celebro de Esperanto-veterano Stefan Popov	9
Petăr Taŝkov. Dankon!	9
Marko Kolev. Utila metodika renkontiĝo	10
* * * La insulo Esperanto	10
A. Todorov. La 31-a monda kongreso de la junaj esperantistoj	10
G. Jozeps. La temo de diploma laboro — Esperanto	10
Asalbaj Undrah. Salutoj de mongola esperantisto	11
Jan Ojalo. Pri la eterna temo — la neologismoj	12
* * * Esperanto-turismo	14
Ivan Vazov. Ekzilitoj. Traduko de S. M. Simeonov	15
I. Vigrieze. Ni estas kune kun la hispana popolo	15
* * * Forpasis Ivan Canev	16
* * * Tra la gazetaro. Deziras korespondi	III-IV

Sur la kovrilpaĝo:

La partoprenantoj en la Internacia Esperanto-Ferio en Velingrad (vd. paĝon 8)

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

- ITALIO:** Julia Franceschi, str. Carducci 32, Padova.
- KOREO:** Korea Esp. Asocio, Pieng' jang P. O. kesto 16.
- NEDERLANDO:** Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.
- RUMANIO:** Mihail Popescu, P. O. Box 205 București 1.
- SOVET-UNIO:** Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 MoskvaV—449.
- SVEDIO:** Karl Krist, Deje, Box 109.



MILIARDA VOĈO DE LA VIRINOJ

„Virinoj, vi estas grandega forto! Laŭtigu vian voĉon, por ke ĝi estu aŭdita en ĉiuj teranguloj! De ĉiu el ni, de nia komuna fortostreĉo dependas la estonto de la homaro! Unuigu vin por komunaj agoj!“

Per tia alvoko finis sian laboron la Tutmonda Kongreso de la Virinoj en Berlino. De tiu ĉi alta tribuno ekportis sin tra la mondo la devizo „Egaleco, disvolviĝo, paco!“ En Berlino kolektiĝis reprezentantinoj de 135 landoj kaj 75 internaciaj organizaĵoj. La kongreshalo brilis de freŝaj koloroj de floroj kaj buntaj naciaj vestaĵoj de virinoj de Japanio ĝis Meksikio, de Ĉilio ĝis Islando. Unuafoje en la homa historio la problemoj de ĉiu dua homo sur nia planedo — la problemoj de la virino — estis diskutataj je unu loko de reprezentantinoj de tiom multaj internaciaj kaj regionaj organizaĵoj, de homoj el diversaj rasoj kun malsamaj konceptoj kaj konfesioj.

„Tiu kongreso, — substrekis s-ino Frida Brown (Braun), prezidantino de la Internacia Organiza Komitato, — estas nedisigebla de la ĝenerala procezo da sereniĝo en la internacia vivo. Antaŭ la atento de la tuta mondo ĝi starigas la problemojn de la homaro, kun ilia tuta komplikeco kaj multflankeco. Ĉar en la lasta kvarono de la XX jarcento, jarcento de grandaj sciencaj inventoj kaj atingoj ankoraŭ milionoj da virinoj malsatas, mortas ĉe graveco kaj naskado kaj estas senigitaj je elementaj kondiĉoj de ekzistado. Ĉar milionoj da virinoj estas analfabetoj, estas diskriminataj kaj humili-gataj, konsiderataj en iuj landoj kiel duaklasaj civitanoj.“

La reprezentantinoj de la bulgaraj virinoj tre aktive partoprenis la laboron de la naŭ kongresaj komisionoj. Iliaj opinioj, spertoj kaj principaj pozicioj vekis grandan intereson. Kun atento oni aŭskultis la eldiron de la honora gastino de la Kongreso k-dino Cola Dragojĉeva — membro de la Politika Buroo de CK de BKP, membro de la Konsilio de Tutmonda Federacio de la Demokratiaj Virinoj kaj laŭreato de Internacia Lenin-Premio por Firmigo de la Paco inter la Popoloj. Ŝi diris: „Ni, la bulgaraj virinoj, bonege komprenas la respondecon de ĉiu el ni por konservi la pacon kaj sekurigi feliĉan estonton por niaj infanoj. Ni estas profunde konvinkitaj, ke tiu ĉi forumo de la tutmonda socio, la vastaj diskutoj en ĝi kreas solidan bazon por kunaj agoj, celantaj firmigi la pacon kaj la kunlaboradon inter la popoloj en la mondo“.

Unuigitaj per la komuna devizo „Egaleco, disvolviĝo, paco“, la partoprenantinoj de la kongreso en Berlino adresis sin al ĉiuj virinoj kaj viroj sur la tero per arda alvoko:

„La faroj kaj la batalo de la nuntempaj generacioj difinas la aspekton de nia planedo dum la estonta centjaro.“

Ni alvokas: ne armigo, sed malarmigo!

Likvidi la pezan heredajon de la koloniismo! Neniu sur la planedo suferu pro malsato!

Egalaj rajtoj en la familio kaj en la socio, egala rajto de laboro, egala salajro por egala laboro!

Virinoj el ĉiuj kontinentoj! Reĉhu al tiu ĉi alvoko kaj subtenu ĝin!

La bulgaraj virinoj reĉhas al ĉi alvoko per sia aktiva laboro por plenumi la popolmastruman planon en ĉiuj sektoroj. Niaj delegitaroj partoprenis ĉiujn forumojn okazintajn lge kun la Jaro de la Virino. Bulgario fariĝis dommaŝtro de la Internacia Renkontiĝo de Virinoj-Juristinoj, de la internacia seminario „La virino en la nuntempa socio“ k. a.

La Esperanto-societoj en la tuta lando organizas kunvenojn dediĉe al la Internacia Jaro de la Virino. En Sofio okazis impona solena kunveno, organizita laŭ iniciato de la Virina Komisiono de CK de BEA, kiun ĉeestis kelkcentoj da ĉefurbaj esperantistoj kaj E-aktivulinoj el la tuta lando. La asocia organo „Bulgara Esperantisto“ kaj la organo de MFM „Paco“ disponis lokon por multaj materialoj lge kun la Jaro de la Virino. La stato de la virino en socialisma Bulgario estis konigita al la partoprenantoj de UK de Esperanto en Kopenhago.

La bulgaraj esperantistinoj, parto de sia libera popolo kaj de la progresema homaro, batalas kaj batalos kun entuziasmo kaj plena energio por definitiva liberiĝo de la virino en ĉiu teritorio el nacia, rasa, socia, religia kaj seksa subpremo, por ŝia plenrajta, sekurita kaj feliĉa vivo!

CK DE BEA PROTESTAS KONTRAŬ LA FAŜISMA TERORO EN HISPANIO

CK de la Bulgara E-Asocio kolere protestas kontraŭ la nova krimo de la faŝismo en Hispanio — la ekzekuto de la kvin junaj patriotoj, same kiel kontraŭ la furioza teroro, kiu inundas tiun landon.

La bulgara popolo estas sange ligita kun la batalo de la hispana popolo por libero kaj demokratio. En tiu batalo multaj karaj bulgaraj filoj — inter kiuj ankaŭ esperantistoj — donis sian vivon dum la civila milito en 1936. Ni eĉ ne minuton povas resti indifereantaj al la viktimoj kaj la suferoj de la hispanaj patriotoj-demokratoj. La sangaj krimoj de la faŝismo en Hispanio, same kiel ĉiuloke, estas krimoj kontraŭ la tuta homaro kaj provo kontraŭ la volo de la popoloj vivi en libero kaj demokratio.

Esprimante la firman kredon de la bulgaraj esperantistoj, ke estas proksima la tago,

kiam la unueca fronto de la kontraŭfaŝismaj fortoj en Hispanio faligos la sangan tiranion, ni arde alvokas: „Demokratoj, honestaj homoj el la tuta mondo, al sentesa kaj aktiva solidaro kun la batalanta hispana popolo!“

For la teroron de la frankismo en Hispanio!

14. X. 1975

CK de BEA

La Redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la Novjaron al siaj multnombraj kunlaborantoj kaj legantoj, dezirante al ĉiuj firman sanon, multan feliĉon kaj fruktodonan E-laboron!



POEZIO kaj BELLETO

Penju Stojanov

PANJO

Disverŝas maron vi
de mildo kaj de larmoj,
odoras je ĝardeno
vi de aromaj rozoj.

Vi brilas kiel stelo
en la malluma nokt',
estingas vi solfon,
vi — akvo en dezert'.

Nom' via estas sankta
en ĉiuj mondepokoj, —
patrin' — idol' unika
en la infanaj koroj.

Per via malforteco
vi novan forton donas
kaj montras vi direkton
al belo kaj esper'.

Per via arda amo
sin tenas tuta ter',
pli helas lumo via
ol milion' da sunoj.

Penka Papazova

Asen Linov

TRAKIO

Ne estas
terlimoj,
ne estas
bariloj, —
senfinaj grenkampoj. . .
Maro el oro
balanciĝas,
maro el ĝojo
kaj esperoj. . .
Ĉi tie venkis la homoj.
La tero,
fruktodona,
floras!
Ĉi tie kolektiĝis kune
tero,
laboro
kaj revoj!

MASONISTOJ

Suno brilas. Vento blovas.
Ni masonas. Ni konstruas.
Falas neĝo. Malheliĝas.
Ni konstruas. Ni masonas.

Novan vivon ni konstruas —
al feliĉo nia ponto.
Ni sur nova vojo paŝas —
ni konstruas por l'estonto.

Pli rapide! Nur antaŭen!
Ni konstruu ĝis la morto!
La idaroj rakontados
pri feliĉa nia sorto.

Rajna Arnaudova

NIA ASOCIA KANCELARIO

Ĝi similas al junulino kun modesta eksteriĝo, sed kun animriĉa pulsado. Dum mia nelongedaŭra laboro tie en mia konscio fiksiĝis galerio da portretoj de homoj de diversaj aĝoj, malsamaj profesioj, variaj interesoj, sed ĉiuj, senescepte, kun brilo en la okuloj.

Kiam mi revenadis hejmen, miaj familianoj renkontis min kun la demando: „Panjo, kiuj feliĉuloj vizitis hodiaŭ vian kancelarion?“ Kaj ĉiam mi havis objektojn por priskribo.

Ĉu oni povas ne memori la belan

junulinon, ĵus finintan la gimnazian kurson, kiu pro emocio apenaŭ tuŝis la anson de la pordo por eniri la ĉambron... Kun flamantaj vangoj kaj rondigitaj okuloj ŝi timeme deklaras: „Mi deziras enskribiĝi en kurso de Esperanto. Kiel vi opinias, ĉu mi sukcesos en la lingvo?“ Post kuraĝiga respondo ŝi reveme aldonas: „Tiel arde mi deziras fariĝi Esperanta artistino.“ Post monatoj ŝi perfekte interpretis versaĵon de Vapcarov en Esperanta traduko.



Eniras ĉe nin grandaĝa pensiulo kun enkondukaj vortoj: „Ĉu en tiu ĉi aĝo oni povas bone lerni?“ Tiu frazo servas kiel kurteno, malantaŭ kiu staras la firma kredo, ke li nepre sukcesos.

Virino, kies sorto alportis al ŝi multajn surprizojn kaj kiu nun bezonas kvietan angulon, deziras lerni Esperanton.

Kun junuleca energio la kancelarion eniras lernanto. Li aranĝas sian unuan veturon eksterlanden. Malpacienco, rapideco, nepreco blovas de li. Lin sekvas patrinaj zorgoj, hezito ĉu oni permesus al li en tia frua aĝo veturi eksterlanden. Post du monatoj la unua veturado estas jam historio.

Eniras la kancelarion etstatura bela virino. Ĉe ŝi dominas la okuloj, plenaj de admiro. De ili vi ne povas rapide retiriĝi. Kaj nur poste vi konstatas, ke ŝi estas graveda, jam en progresinta stadio. Ŝi rapide informiĝas pri la novaj kursoj de Esperanto, ankoraŭ pli rapide donas sian adreson, ĉar ekstere

sur la strato atendas ŝin la edzo kaj la 4-jara filo.

Sciencisto rekomendas sin kiel konanto de kelkaj okcidentaj lingvoj, tamen li ne dubas, ke Esperanto kontribuos multon al li.

Iom brue alpaŝas larĝsultra navigisto. Per sia rigardo, kutima al malproksima horizonto, li kvazaŭ traboras la murojn de la mallarĝa kancelario. Tranagiinte la oceanojn, li deziras studi la lingvon de la paco, kiun li disportos tra la tuta mondo. . .

Kaj ĉiutage novaj kaj novaj esperoj ekbrulas en tiu modesta fajrujo de Bulgara Esperantista Asocio.

Nun, kiam mi ne plu laboras en la kancelario de BEA, jam spontane elnaĝas portretoj el tiu Esperanta galerio kaj efikas sur min kiel refreŝiga printempa blovo. Kaj mi estas certa, ke ĉiuj ĉi personoj per unu plia velo direktas sian vivŝipon al la dezirata idealo.

Sukceson al ĉiuj!



SANGO SUR LA VERDA STELO

Por eviti areston fare de la faŝista polico, komence de junio 1933 mi alveturis Sofion, esperante trovi laboron kaj loglokon ĉe mia amiko Mitko Surlev.

Jam ĉe la centra stacidomo min impresis la faŝistaj propagandiloj — ruĝaj flagoj kun svastiko, portretoj de Hitler. Sur la fasado de kelketaĝa domo (nun tie staras CUM) estis pendigita granda rulkurteno kun devizo: „Vivu la bulgar nasisocialista partio kaj ĝia gvidanto Ĥristo Kunĉev!“ Tio evidentigis, ke la bulgaraj reakciuloj adaptas sin al la novaj cirkonstancoj en okcidenta Eŭropo, kie furiozis hitleranoj. La reganta kliko ĉekape kun reĝo Boris III sekvis la terormetodojn de Hitler por timigi la antifaŝistojn. Kiel murdistoj estis dungitaj la bandoj de Vanĉjo

Miĥajlov¹, kiuj sub la ŝirmo de la polico pafmortigadis surstrate gvidantojn de la Laborista Partio.

En sia lasta letero al mi Surlev skribis, kie mi devas trovi lin. Kiel mi nun rememoras, la loko estis iu manĝejo sur strato „Car Simeon“. La trian de junio mi trafis lin. Li manĝis kun iu persono, kies dekstra ŝuo havis dikan plandon — estis lamulo. Surlev prezentis min al sia samtablano kaj komencis babili en Esperanto. Li parolis libere en la Internacia Lingvo. Nia interparolo kaŭzis malplezuron ĉe la samtablano.

¹ Vanĉjo Miĥajlov — ĉefo de faŝista koterio, kiu kun aprobo de la ministro de internaj aferoj Girginov organizis atencojn kontraŭ multaj antifaŝistoj.



—Parolu bulgare, ke ankaŭ mi komprenu vin! — insistis la lamulo.

— Jakim tute ne posedas talenton pri lingvoj, — rimarkis kun rideto Surlev. — Jen pro kio li ĵaluzas.



Elirinte el la manĝejo ni direktis nin al Knjaĵevo por bani nin en ties kuracbanejo. La lamulo postsekvis nin. Sur placo „Sveta Nedelja“ ni eniris tramon, la lamulo ankaŭ.

— Kial tiu lamulo sekvas vin kiel via ombro? — mi demandis Mitkon.

— Li gardas min kontraŭ malamikoj.

— Kiuj estas viaj malamikoj?

— La murdistoj de Vanĉjo Miĥajlov. Ili prenis mezuron por mia staturo.

— Ĉu vere oni konsideras vin danĝera?

— Evidente. Vanĉjo Miĥajlov ne povas toleri en la makedona organizo opozician agadon. Mi tamen ne timas la morton. Ĝin timas tiuj, kiuj ne havas celon en la vivo.

Dum ni banis nin, la lamulo gardostaris en la vestejo.

Refreŝiĝinte ni revenis al Sofio kaj disiĝis, promesante revidi unu la alian vespere en manĝejo ĉe la sukerfabriko.

Sencele promenante tra la stratoj, mi revokis en mian memoron epizodojn el la vivo de Surlev.

— — — — —

Kial li fariĝis fervora esperantisto? Unu el la kaŭzoj estis lia patrolando Makedonio. En ĝi loĝis bulgaroj, grekoj, turkoj, ciganoj, hebreoj, albanoj. Surlev eksciis de iu esperantisto, ke ekzistas projekto de konstitucio pri sendependa Makedonio. Ĝi kuŝas en la arkivoj de la okcidenteŭropa diplomatio. Laŭ tiu ĉi konstitucio, makedonoj devas uzi Esperanton kiel lingvon de publikaj institucioj. Tiel oni evitus ĵaluzon ĉe la diverslingvaj enloĝantoj kontraŭ iu ajn oficiala lingvo ol ilia gepatra. Tiu projekto plene obsedis Mitkon, kvankam ĝi estis nerealigebla, ĉar laŭ la Parizaj Diktatoj de 1919 Makedonio estis dividita ĉefe inter la venkintaj balkanlandoj.

— Tiu eksperimento ne sukcesis en balkana skalo, — foje diris al mi Surlev, — sed ĝi sukcesos en monda skalo. Kiam tio okazos, dependas de ni mem. . .

— — — — —

La somero, 1926 jaro. La stacidomo de Plovdiv. Grupeto da esperantistoj forlasas la trajnon kaj direktas sin al la ĉefa strato. Antaŭ la grupeto marŝas belstatura junulo, alte tenanta verdan standardon. Preterpasantoj gapas al ni. En la urbocentro policano haltigas nin, supozante, ke ni demonstracias kontraŭ la registaro.

— Haltu! Kiuj vi estas? — demandas la policano.

— Esperantistoj! — laŭte respondas Surlev. — Ni iras al la kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio.

La uniformulo certe unuafoje aŭdas pri Esperanto kaj ne povas juĝi pri nia konduto. Ni marŝas plu al la urba teatro, kie okazos la kongreso. . .

La kongreson ĉeestis la angla esperantisto Yelland kun sia rusdevena edzino Tereza. Eksciinte, ke la geedza paro venis el Leningrado, kie ili parto-

prenis Esperanto-kongreson, Surlev interesiĝis pri la vivkondiĉoj en la juna socialisma ŝtato, pri ties junularo, pri la soveta Esperanto-movado. Gesamideanoj Yelland informis lin pri ĉio, kion ili spertis en la urbo de Lenin.

— La leningradaj esperantistoj, — rememoris samideano Yelland, — renkontis nin sur la kajo per muziko kaj verdaj flagoj.

La informoj el la buŝo de Yelland ankoraŭfoje pruvis al Surlev, ke la burĝa gazetaro simple sputas mensogojn kaj aĉajn insultojn kontraŭ la unua en la mondo ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj.

Tiutempe Surlev loĝis kun sia familio en vilaĝeto Gorni Voden apud Asenovgrad. La vilaĝeto kuŝis ĉe la piedoj de Rodopi-montaro. Iom pli supre de Gorni Voden situis la monaĥejo Sankta Kiriko. En ĝi loĝis monaĥoj elmigrintaj el Sovetio dum la intercivitana milito.

Dimanĉe ni, la asenovgradaj esperantistoj, ofte ekskursis al la pitoreska ĉirkaŭaĵo de la monaĥejo, amuzis nin sub la branĉaro de centjaraj ulmoj. Unu el la monaĥoj, Pimen, parolis perfekte Esperanton kaj regule aliĝis al nia gaja kompanio. Vivante konforme al la reguloj de la kristana religio, la monaĥo defendis la kristanajn dogmojn kaj parolis pri rigidaj marksismaj dogmoj, kiuj katenas la rusan popolon. Surlev verve polemikis kun li, pruvante, ke la marksismo-leninismo ne katenis la sovetajn popolojn, sed liberigis ilin. Argumentojn kaj kontraŭargumentojn ni aŭdis dum multaj ekskursoj. Surlev montris al Pimen siajn korespondaĵojn el Sovetunio, havigis al li okcidenteŭropajn Esperanto-gazetojn, en kiuj Pimen legis la veron pri la rusa revolucio. En la sama jaro gesamideanoj Yelland gastis al asenovgradaj esperantistoj. Inter la gastigantoj estis ankaŭ Pimen. Li kaptis okazon demandi la anglon pri Sovetio.

Yelland respondis proksimume la jenon:

— Ruslando estas vere ŝtato de laboristoj kaj kamparanoj. En ĝi la gvidforto estas la laborista klaso. . . Estas nura mensogo kaj kalumnio, ke la milico arestas senkaŭze. . . En Leningrado mi vidis malfermitajn preĝejojn kaj maljunajn virinojn, kiuj lumigis kandelojn antaŭ ikonoj kaj preĝis. . .

Iutage monaĥo Pimen surprizis nin deklarante, ke li forĵetos la sutanon kaj serĉos vojon al sia patrolando. . .

— — — — —
En la komenco de la tria jardeko enmodiĝis la vegetara, senvianda nutrado. En sia granda parto la vegetaranoj rilatis favore al nia lingvo. Foje dum kunveno iu esperantistostudento referis antaŭ ni pri la malutilo de viandokonsumo. Post la referaĵo Surlev petis la parolon kaj deklaris, ke lia familio manĝas viandon nur unu-dufoje dum la jaro, ĉar ĝia prezo estas sufiĉe alta. Li konkludis:

— Ni, laboristoj, vole-nevole estas vegetaranoj. . . Mi revas pri la tempo, kiam ni, la malriĉuloj, povos aĉeti kolbasojn kaj viandon ĉiutage.

La kompatinda vegetarano ridindigis, ĉar la granda plimulto de la ĉeestantoj similis al Surlev. . .

En februaro 1928 Mitko iris militservi en Plovdiv. Post kelkaj monatoj oni translokiĝis lin al Târnovo por studi en suboficira lernejo. Tie li sukcesis konvinki la lernejestron kaj tiu permesis al li organizi kurson de Esperanto kun dudek partoprenantoj — ĉiuj soldatoj. Surlev gvidis la kurson. Krom la lernolibro li utiligis la romanon de Julio Baghy „Viktimoj“. Ĝi estas esence pacifista romano, tamen la lernejestro trovis ĝin danĝera kaj malpermesis ĝin.

Oni senigis Surlev je la „honoro“ porti epoletojn. Reveninte en la civilan vivon li kontaktis plu kun progresemaj soldatoj en la kazernoj de Plovdiv, zorgis pri la antiimperialisma



ĉeloj (AMI), havigante al la soldatoj antirasistan literaturon.

Estante konvinkita komunisto Surlev farigis protesia revoluciulo. Li disvastigis nelegalajn gazetojn, inter ili „Balkanlanda Federacio“ kaj „Makedonsko Delo“ (Makedona Afero). Li veturis al urboj, kie logis elmigrintoj el Makedonio, kaj varbis anojn al VMRO (makedona progresema organizaĵo).

Lia agado en Varna, Burgas, Ĥaskovo, Dupnica, Sveti Vrac k. a. ne restis sekreto por la spionoj de Vanĉjo Miĥajlov, kiu verdiktis: „Morton al Surlev!“.

Sed la mortverdiko ne timigis la bravan homon. Li havigis al si revolveron kaj laboris plue kun pli granda fervoro por klaskonsciigo de la laboramasoj.

Jam venis tempo iri al la rendevuo kun Mitko. En vespera horo mi eliris sur senhoman placon en la okcidenta parto de Sofio kaj serĉis gastejon „Dobriĉ“. Mi rimarkis la gastejmastron antaŭ la pordo, lamentanta ĉe ies kadavro. Mi aliris kaj en la lumo de la elektra lampo, kiu pendis super la enirejo, vidis la mortigiton. Inter distorditaj harbukloj palis granda inteligenta frunto. Estis mia kara amiko. Liaj ka-

tankoloraj okuloj estis ankoraŭ malfermitaj. Sangostrio fluis inter la maldikaj lipoj. La verda stelo sur la refo de la disŝirita jako estis ankaŭ sangomakulita.

La gastejmaestro daŭre lamentis ĉirkaŭ la kadavro. El la proksima policejo eliris du policianoj kaj direktis sin al la murdoloko. Mi rapide torpaŝis de la gastejo.

Post kelka tempo mi vizitis la familion de Surlev. Lia irato rakontis al mi, ke verŝajne lin denunciis lia propra korpogardisto, kiu akompanis lin gis la gastejo. La drinkejmaestro atestis, ke dum Surlev vespermanĝis, kvin personoj eniris kaj okupis tablon. Unu el ili ordonis al la gastejmaestro eniri la kelon por alporti malvarman vinon. La drinkejmaestro eniris en la kelon,—kaj oni ŝosis lin tie. La kvaropo sin jetis al Surlev kun ponardoj kaj revolveroj en la manoj. Surlev pugnobatis ilin kaj traboris al si vojon al la elirejo. Vidante, ke li savos sin, la murdistoj patis en lian dorson. Surlev stumblis kaj falis senviva antaŭ la elirejo. La murdistoj, konvinkiginte, ke li estas morta, malaperis en la mallumo.

Tio okazis la trian de junio 1933.

Hrima

ORGANIZA VIVO

AMIKOJ DE ESPERANTO, AMIKOJ DE LA MONTARO

Vojaĝas esperantistoj el multaj landoj laŭ vojoj malproksimaj kaj proksimaj. En la freŝa somera mateno ili rapidas al la Internacia E-Lernejo en Pisanica, Smoljan-distrikto. Ĉiu laŭ sia maniero travivas la emociojn, naskitajn de la beleco de Orfeo-montaro, de la rakontoj pri la paraŝutistoj kaj la agoj de la partizana taĉmento „Kolju Ŝiŝmanov“.

La vortoj de Jeŝi Dreja — prezidanto de la pola E-junularo, plenigas niajn korojn per fiero: „Vi estas feliĉaj vivi en tiu ĉi belega angulo. Ni revos pri duafoja veno al Pisanica, kie naskiĝas vera amikeco, por senti denove

la varmon de la dommastroj, de la homoj en ĉi tiu montaro.“

„Unuafoje mi estas en Bulgario, en Rodopi-montaro. Tamen mi ne sentas min fremda, ĉar ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en rusa kaj bulgara lingvoj ni bonege interkompreniĝas“ — konfesas Valentina Kalaŝnik el Krasnodar.

Entuziasme parolas pri nia lando Heta Kesala — sekretario de la Finlanda E-Junularo, la geinstruistoj Rakoci Edit kaj Ĉoban Erika el Hungario ka.

La vojo finkondukas nin ĉe la lernejon. Ni ekiras post la sonoj de la Himno de demokra-

tia junularo- Sur la herbejo inter fruktarboj sidas gejunuloj el la E-kurso por komencantoj. Docento Georgi Dimov el Varna lerte gvidas la lecionon. Sur la nigra tabulo Ŝlitz Pirojka el Ĉeĥoslovakio skribis legeble: „Bulgario estas bela lando. .“.

Venas tagmanĝo. La manĝejo allogas per neĝblankaj tablotukoj kaj bongusta manĝaĵo.

Postagmeza ripozo kaj liberaj okupoj — ludoj, amika kunesto. Iuj preferas utiligi la sunradiojn sur la herbejo, aliaj preparas sin por vespero de la amikeco.

La E-Lernejo estas malfermita en 1973 j. La komenco estis malfacila. Paralele kun la plibonigo de la kondiĉoj en la lernejo kreskis

ankaŭ la nombro de la partoprenantoj en ĝi. Nun dum la somera sezono en sep sinsekvaj grupoj havas la eblecon studi Esperanton tie pli ol 600 eksterlandaj kaj nialandaj civitanoj.

Interesaj vesperoj, ekskursoj al pitoreskaj lokoj kaj arkitekturaj monumentoj, al la novaj socialismaj urboj Madan kaj Rudozem. Oni ne povas elnombri ĉiujn aranĝojn, kiuj okazas ĉi tie. Kiam forpasas la tagoj de la grupo la vilaĝeto Pisanica forsendas la junajn homojn harditaj fizike, kun amo en la koroj al nia lando. Ili forportas kun si amikecon, kiu naskiĝis en la montaro. Ilian lokon okupas novaj amikoj de Esperanto kaj Rodopi.

Maria Diĉeva

LA INTERNACIA E-FERIO EN VELINGRAD

De la 25 de septembro ĝis la 5 de oktobro en Velingrad, situanta en la ĉarma Rodopimontaro, okazis 10-taga Internacia E-Ferio. Ĝin partoprenis 65 esperantistoj, inter kiuj 9 el Bulgario kaj la ceteraj el USSR, Pollando, Hungario, GDR, ĈSR.

La programo estis varia kaj bone aranĝita: ĉiumatene mikroturismo, poste mineralakva banado, kelkaj prelegoj, ekskursetoj al la montopinto „Ostrec“ kaj la pereolokoj de esperantistoj-kontraŭfaŝistoj, akcepto en la Urba Komitato de BKP, kie sekretario konigis al la gastoj la pasintecon kaj la perspektivojn de la urbo kaj la distrikto, interkona kaj adiaŭa vesperoj k. a. Okazis du tuttagaj ekskursoj: unu al la subtera akva elektrocentralo „Peŝtera“ kaj la groto „Sneĵanka“ kaj alia — al u. Pazargik kaj la virejoj de Karabunar (unu el la plej grandaj en Bulgario — pli ol 110 hektaroj), kie oni rikoltas la vinberojn per specialaj maŝinoj (kombajnoj).

Aparte notinda estas la celebrego de la 50-jara jubileo de la loka E-Societo „Stoju Kalpazanov“, kiun partoprenis ĉiuj feriantoj. En la salono de la centra legejo (kulturdomo) de la urbo kolektiĝis pli ol 800 esperantistoj — lokaj kaj el la najbaraj distriktoj. Raporton pri la historio kaj la nuntempa agado de la societo faris ĝia multjara prezidanto kaj E-veterano Manol Ĉolev. Li rakontis, ke komence la societo havis la nomon „Bor“ (Pino) — simbolo de nevelkanta idealo. En ĝiaj sinoj kreskis kaj edukiĝis sindonaj esperantistoj kaj internaciistoj, kiuj herce batalis kontraŭ la monarkofaŝismo en nia lando. Inter ili brilas la nomoj de Vela Peeva — popola heroino, pereinta en malegala batalo — sola kontraŭ kelkcentoj da faŝismaj ĝendarmoj (honore al ŝi en libera Bulgario oni nomis la urbon Velingrad, t. e. la Urbo de Vela), de Stoju Kalpazanov — juna partizano, infere torturita kaj pafmortigita de la faŝistoj (nun lian nomon portas la loka E-Societo), Angel Ĉopev — sindona kon-

traŭfaŝista batalanto, kiun la polico pafmortigis, k. a. K-do Ĉolev substrekis, ke nuntempe unu el la ĉefaj taskoj de la esperantistoj estas la firmigo de la tutmonda paco kaj la amikeco inter la popoloj.

La jubileuloj estis salutitaj de la sekretario de UK de BKP Petr Kalojanov, de la prezidanto de BEA Nikola Aleksiev, kiu enmanigis al meritaj esperantistoj la jubilean insignon de BEA, de Boris Zaskalov el USSR, Linhard Riznar el Ĉeĥoslovakio, Mitkaŝ Kiŝ el Hungario, Upo Kolbe el GDR, Marian Loba el Pollando k. a. Estis ricevitaj multaj salutleteroj el la lando kaj eksterlando.

La ĉeestantoj ĝuis ankaŭ belartan programon de junpioniroj k. a., rigardis ekspozicion pri la evo'uvojo de la E-Societo.

La Internacia E-Ferio en Velingrad plene sukcesis.

R. A., M. Ĉ.

La 60-a UK de Esperanto en la Bulgara Televido

La 30-an de septembro la Bulgara Televido en sia dua programo elsendis 25-minutan filmon pri UK de Esperanto en Kopenhago. La filmo prezentis momentojn el la kongreso, intervjuojn kun s-ro G. Külmann — prezidanto de LKK, d-ro H. Tonkin — prezidanto de UEA, Veselin Belomâjov — bulgara ambasadoro en Kopenhago, N. Aleksiev — prezidanto de BEA kaj MEM, K. Drajev — gvidanto de la Bulgara E-Teatro. Sekvis raportaĵo pri la spektaklo de BET „La servisto de du mastroj“ de K. Goldoni, prezentita antaŭ la kongresanoj.

Ĝis nun la Bulgara Televido elsendis momentojn el aliaj aranĝoj de la bulgaraj esperantistoj, sed tiu ĉi estis la plej longa kaj enhavoriĉa.

Informa Servo de BEA



La esperantistoj de Ruse solene celebris la 55-jaran E-agadon de Stefan Popov. Pri lia vivo kaj laboro parolis Stojan Vojev. La celebrato respondis per kortuŝaj dankaj vortoj kaj deklaris, ke li, malgraŭ sia 73-jara aĝo, laboros sindone por Esperanto ĝis la lasta spiro.

Sube ni donas koncize la paroladon de St. Vojev.

Stefan Ganev Popov naskiĝis en 1902 en familio de instruisto en vilaĝo Ĉervena Voda, distrikto de Ruse. Kiel gimnaziano en Ruse li ellernis kaj ekamis forte la internacian lingvon Esperanto. Tuj post la gimazio li fariĝis instruisto en la elementa lernejo en v. Hotanca, Ruse-distrikto. Krom kiel instruisto li disvolvis en la vilaĝo viglan eksterlernejan agadon. Laŭ lia iniciato estis fondita legejo (kultura societo), kies gvidanto li estis dum multaj jaroj. Helpate de sia edzino, Paŭla Popova, ankaŭ instruistino, Popov estis la animo de ĉiu kultura aktiveco en la vilaĝo. Prelegoj alternis kun diversaj kursoj, inter kiuj ankaŭ kursoj de Esperanto.

La deziro de Popov estis ricevi superan klercon kaj li atingis tiun celon, ne interrompante la ligojn kun la vilaĝo. Pli maltrue

kiel advokato li same aktive partoprenis en la socia vivo. Dum pli ol dek jarojn li estis sekretario de organizaĵo de la Patrolanda Fronto, gvidis diversajn studrondojn, faris prelegojn. Li estis vera popola advokato. Estime kaj ame rilatis kaj rilatas al li kaj vilaĝanoj, kaj urbanoj. Proksimume 12 jarojn li estis kasisto de E-Societo „Libero“ en Ruse. Nun li estas kasisto de la Distrikta komitato de BEA en Ruse. Stefan Popov faris multajn prelegojn antaŭ esperantistoj kaj neesperantistoj, gvidis multajn E-kursojn kaj rondojn. Neniam li ŝparis siajn fortojn por la disvastigo de Esperanto.

Stefan Popov estas ankaŭ talenta tradukanto en Esperanton. Kelkfoje li gajnis premiojn en konkursoj de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“.

DANKON!

Nia s-ano Petr Taŝkov — veterano de la E-movado, partopreninta en la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, fariĝis jam 80-jara. Li ankaŭ nun laboras entuziasme por Esperanto kiel aktivulo de la Jurista E-Sekcio „Justeco“. Jen liaj dankaj vortoj al la multnombraj samideanoj, kiuj salutis lin:

Per la paĝoj de „Bulgara Esperantisto“ mi esprimas mian dankon al la Sofia Urba E-Societo „Maksim Gorkij“ kaj al ĉiuj samideanoj, kiuj salutis min okaze de mia 80-a naskiĝtago kaj 65-jara E-agado.

Mi uzas la okazon por bondeztri al ĉiuj geesperantistoj ankoraŭ pli longan vivon ol la mia. Kaj oni ne forgesu la testamenton de Zamenhof:

L'espero, l'obstino kaj la pacienco — jen estas la signoj, per kies potenco ni paŝo paŝo, post longa laboro, atingos la celon en gloro!

Mi deziras, ne — mi insiste volas, ke ĉiuj niaj esperantistoj, kaj precipe la junaj, laboru kaj donu laŭ siaj fortoj kaj eblecoj kiom eble pli por la sukceso de nia amata lingvo Esperanto!

Ankoraŭfoje mi dankas!

PETR TAŜKOV

Amika renkontiĝo

Septembre en Vraca gastis al sia amiko Ivan Maŝev la E-jurnalisto Alfred Krauskair el Berlino, GDR. Li vizitis ankaŭ kunvenon de la loka E-Societo „Sukceso“, kiu okazis en la Distrikta Junulara Domo.

K-do Krauskair rakontis pri la E-vivo en Berlino. R. Tričkov rakontis al li pri la E-movado en Bulgario. La direktoro de la Domo priskribis ĝian laboron. Li proklamis nian gaston kiel honoran membron de la E-klubo de la Domo kaj enmanigis al li specialan medalon kaj flagon.

Enjo Daskalov

Restoracio „Esperanto“

Ĉi-somere en la ripozejo „Slančev Brjag“ de la Nigra Maro estis oficiale inaŭgurita moderna restoracio „Esperanto“.

La inaŭguro komenciĝis per la himno „La Espero“, plenumita de la Esperanto-horo „Nigra Maro“ — Burgas.

K-do Jivko Jivkov, membro de Politburoo de CK de BKP kaj vicprezidanto de la Ministra Soveto, tranĉis la rubandon kaj deklaris la restoracion malfermita. En plenplena salono la horo plenumis programon nur el Esperanto-kantoj. Gastoj el Ĉeĥoslovakio dankis al ĝi kaj prezentis florojn.

V. Darakčieva

Utile metodika renkontiĝo

Fine de septembro en Kazanlâk okazis metodika renkontiĝo de esperantistoj. Partoprenis ĉ. 30 personoj el la urbo kaj la regiono. Post traktado de kelkaj organizaj demandoj, pri kiuj raportis la prezidanto de la societo Dimo Martinov kaj la sekretario Paun Nestorov, la konataj E-kursgvidantoj Maria kaj Jordan An-

gelov el v. Ĉeŝnigirovo, Plovdiv-distrikto, faris prelegojn pri metodikaj demandoj de la E-instruado al komencantoj kaj progresintoj.

La ĉeestantoj alte taksis la faritajn metodikajn prelegojn kaj sincere dankis la prelegintojn.

Marko Kolev

LA INSULO ESPERANTO

Kvin kilometrojn oriente de u. Orjaĥovo, inter la akvaro de r. Danubo altas insulo Esperanto — unu el la plej pitoreskaj anguloj de tiu parto ĉe Vraca-distrikto. La insulo datiĝas de 1925, kaj ĝiaj unuaj „konkerantoj“ estas la esperantistoj de la loka E-Societo „D-ro Zamenhof“. Ĝuste ili nomis „Esperanto“ la novan teritorion aperintan meze de la granda rivero. La urba komunumo per kontrakto de 1930 j. sankciis la proprieton de la E-societo super la insulo. Ekde tiam ĉi tie okazas diversaj aranĝoj de la esperantistoj. Krom per boato oni povas atingi la insulon laŭ bona asfaltita vojo. De Orjaĥovo ĝis tie la bordo dronas en verdaĵo. Ĝojigas la okulojn ankaŭ belaj vinberejoj.

Dum la lastaj jaroj ĉi tiu loka ripozejo fariĝis ankoraŭ pli alloga. Oni konstruis grandan turistan domon kun restoracio kaj nekovritaj terasoj. Ĉirkaŭe elkreskis ripozdomoj kaj vilaĝoj de laboristoj kaj oficistoj el la industriaj entreprenoj kaj oficejoj de la urbo. Sur malgranda oblikva deklivo aperis koloraj dometoj de junpionira tendaro. La proksima fontano „Kapitanec“ provizas ĉiam abundan akvon. Signo memorigas pri la kruela neniigo de grupo da partoprenintoj en la glora Septembro Ribelo 1923. Dum la jaroj de la kontraŭfaŝisma batalo ĉi tie okazis oftaj nelegalaj renkontiĝoj.

Somere, post la retiriĝo de la riverakvo, ĉirkaŭ la insulo etendiĝas granda strio de argentkolora sablo kaj tiu loko ankoraŭ pli vivigas — al la plaĝo venas centoj da homoj, sur la rivero naĝas boatoj kaj kutroj.

La loĝantoj de Orjaĥovo havas la grandan ambicion transformi insulon Esperanto kaj ĝian ĉirkaŭaĵon en aparte allogan angulon por ripozo.

Laŭ j. „Rabotniĉesko Delo“, 237/1975



TRA LA E★ MONDO

LA 31-A MONDA KONGRESO DE LA JUNAJ ESPERANTISTOJ

De la 19 ĝis la 26 de julio en la dana urbo Fredericia okazis la 31-a monda kongreso de la junaj esperantistoj.

Ĉe la inaŭguro la 270 kongresanoj el 38 landoj estis salutitaj de la dana ministro de kulturo, de la urbestro, de la loka turista agentejo k. a.

Baza temo de la kongreso estis la kultura interŝanĝo inter la junuloj-esperantistoj, la eblecoj de Esperanto tiurilate.

Enkadre de la kongreso estis aranĝitaj interesaj vesperoj de malmulte konataj kulturoj, de la popolaj kantoj kaj dancoj en Danlando, balo k. a. Okazis ankaŭ gastado en danaj familioj, kie Esperanto estas parolata, kaj tuttaga ekskurso al insulo Fuenaa kaj urbo Odense — la naskiĝloko de H. K. Andersen, al la kastelo Egeskov k. a.

En la kunsidoj de la Komitato de TEJO partoprenis la bulgaraj esperantistoj Angel Todorov, Dimităr Papazov kaj Todor Dimitrov.

Kiel prezidanto de TEJO estis elektita s-ano Claude Nourmont (Klod Nurmon) — Francio.

Oni decidis, ke la 32-a kongreso de la junaj esperantistoj en 1976 okazu en u. Tesaloniki, Grekujo.

A. Todorov

LA TEMO DE DIPLOMA LABORO — ESPERANTO

Liga Berzinja, diplomito ĉe la filologia fakultato de la Latvia Universitato „P. Stučka“, defendis sian diplomlaboron, ricevinte la plej altan poenton „kvln“. La temo estis neordinara: „Evoluo de la ideo pri internacia lingvo“.

Estinte ankoraŭ studentino en la III kurso, Liga hazarde vidis afiŝon de la Domo de Instruisto, anoncanta E-kurson. Si finis kvarmonatan kurson, fariĝis aktivulino en la junu-



ara sekcio de la E-klubo en Riga, partoprenis diversajn entreprenojn de la klubo.

Liga rakontas: „Vi devas preni tian temon, ke ĝi estu proksima al vi, ke ĝi maltrankviligu, interesu vin“. Ŝi konsultis siajn instruantojn pri la demandoj de la nova scienco — interlingvistiko, legis specialan literaturon.

Kaj jen — Liga Berzinja staras antaŭ la ŝtata komisiono, respondante senhezite ĉiujn demandojn de sia oponento — instruanto en la Latvia Stata Universitato N. Sapinĵ.

La planoj de Liga por la estonto: instrui

la gepatran lingvon kaj literaturon en la vilaĝalerno apud Jaunaŭce.

Planoj por la plej proksima tempo: partopreno en la renkontiĝo de la sovetaĵ E-kluboj en Altaj-regiono.

Ĉiam kaj ĉie Liga Berzinja restas fidela al sia principo: „Por paco, por amikeco sur nia planedo, por komuna internacia helpa lingvo de komunikado kaj kompreniĝo!“

G. Jozeps

(J. „Sovetskaja Molodĵej“, № 161/1975)

SALUTOJ DE MONGOLA ESPERANTISTO

K-do Asalbaj Undrah el la Mongola Popola Respubliko partoprenis en la Internaciaj Esperanto-Kursoj por Instruistoj en Burgas. Revene, en Sofio li ĉeestis kunvenon de E-Societo „Maksim Gorkij“, en kiu li rakontis pri sia lando kaj la E-movado en ĝi.

Karaj gekamaradoj!

Mi ĝojas saluti vin je la nomo de la esperantistoj el fora amika lando — Mongola Popola Respubliko. En vian landon mi venis speciale por studi en la Internaciaj E-Kursoj en Burgas. La ŝtato pagis al mi la vojaĝon kaj donis al mi ofican forpermeson.

Mi estas oficiro en la Mongola Revolucia Armeo. Esperanton mi komencis lerni en la vesperaj kursoj ĉe la Universitato en Ulan Bator.

Mi deziras rakonti al vi pri mia lando kaj popolo.

Mia patrolando situas en Centra Azio.

En 1921 la popola revolucio venkis kaj estis fondita la Mongola Popola Respubliko.

Mi loĝas en Ulan Bator. Ĝi estas la ĉefurbo de nia respubliko. Mongolio estas bela, granda kaj riĉa lando. Ĝia teritorio estas 1 569 963 km². De oriento al okcidento estas 2405 km., de nordo al sudo — 1263 km. La limo havas 7670 km (kun Sovetunio 3 000 km kaj kun Ĉinio — 4670). Nia lando havas 1 678 800 loĝantojn, kiuj parolas multajn lingvojn.

Vasta kaj bela estas nia patrolando. Senlima estas la dezerto Gobi. La gobianoj prikantas la belajn de sia Gobilando. La steploĝantoj de la nordo ankaŭ amas siajn stepojn. Amplene ili nomas sian landon Ĥangaj, kio signifas „lando de la dezirplenumo.“ En Mongolio ekzistas pli ol 2050 specoj de kreskaĵoj. Vere, la granda stepo de la nordo estas por la steploĝantoj „lando de la dezirplenumo“ kun siaj majestaj montoj, grandaj lagoj kaj riveroj,

vastaj ebenaĵoj, kovritaj de tapiŝo el bonodoraj floroj kaj herboj. Admirindaj estas la pitoreskaj pejzaĝoj de Ĥangaj, kun estingiĝintaj vulkanoj kaj grandaj montaroj, kovritaj de densaj arbaroj. Multaj monumentoj de la pasinta glora historio de nia popolo — unu el la antikvaj popoloj — atendas siajn esplorantojn.

Bonkora, liberama kaj laborema estas nia popolo, kreinto de mirinde belaj legendoj, rakontoj, kantoj kaj herooj eposoj.

Post la popola revolucio en 1921 nia patrolando kun longa historio kaj kulturo fariis pli bela kaj pli juna ol dum la pasintaj multaj jarcentoj. Miaj liberaĵoj kaj laboremaj gefratoj kreas novajn urbojn, disvolvas plue la ekonomikon kaj la kulturon de la lando. Niaj poetoj, verkistoj kaj komponistoj prikantas la heroan laboron de nia brava popolo, kiu sub la gvidado de sia Popola Revolucia Partio konstruas la socialismon.

La E-movado en Mongolio estas tute nova. Ekde du jaroj en la Universitato de Ulan-Bator funkcias E-kursoj. Ilin gvidas k-do Renĉin — profesoro kaj doktoro de la filologiaj sciencoj. Jam 60 personoj finis ilin. Kiel mi diris, ankaŭ mi komencis lerni Esperanton tie. En nia lando estas ĉ. 150 esperantistoj. Je ilia dispono estas lernolibro, Esperanta-Mongola kaj Mongola-Esperanta vortaroj. Ni esperas, ke la internacia lingvo Esperanto estos bona ilo de kompreniĝo kaj amikeco inter nia popolo kaj la aliaj popoloj en la mondo. Tial mi diras: Vivu la fratiga lingvo Esperanto! Vivu la paco en la tuta mondo!“

PRI LA ETERNA TEMO — LA NEOLOGISMOJ

En „Bulgara Esperantisto“ n-ro 2 — 1975 G. Gercikov denove pritraktas la saman temon, postulante bojkotadon, malpermeson de „senbezonaĵaj centprocentaj sinonimoj“. Por kaj kontraŭ enkonduko de novaj vortoj en la Internacian Lingvon oni tiom multe skribis en niaj gazetoj, ke jam preskaŭ ne necesus novaj tiutemaj artikoloj. Des pli, ke ankaŭ G. G. mem konkludas: „La vivo marŝas antaŭen. La lingvo devas evolui“. Do, restas nur la problemoj: kiamaniere ĝi evoluu? Ĉu laŭ ordonoj de iuj instancoj — akademio, redakcioj; ĉu pere de verkoj de eminentaj verkistoj, poetoj, kiuj elpensu novajn vortojn kaj uzu ilin en siaj verkoj? Aŭ evoluigu ankaŭ la Internacian Lingvon la vivo mem — per la uzantoj de la lingvo, kies kolektiva kreaĵo ĝi estas laŭ la Zamenhofa rifuzo pri posedrajtoj?

Mi estas estono kaj mia gepatra lingvo estas la estona. Dum pli ol 50 jaroj mi povis konscie sekvi kaj observi ĝian evoluigon kaj evoluon, tre similan ne nur al Esperanto, sed — mi opinias — ankaŭ al aliaj naciaj lingvoj.

Kiaj estis la ĉefaj vojoj de la evoluo?

1. Konekse kun la evoluo de la tekniko, scienco, kulturo aperis novaj nocioj, novaj vortoj, ordinare jam internacie uzataj: magnetofono, televido, komputilo, satelito ktp.

2. Pliprecizigo de ekzistantaj nocioj kaj vortoj: radveturilo — aŭto/mobilo), biciklo, skotero, mopedo, troleo (bus)o. Trafikteknika evoluo postulas klasifikon de diversaj radveturiloj, iliaj novaj tipoj postulas ankaŭ novajn nomojn, estiĝon de novaj vortoj. Tiel same ankaŭ aliaj fakoj de la tekniko.

Verŝajne oni ne rajtas, nek kapablas malpermesi tian naturan pliriĉiĝon de la lingvo — nacia aŭ la internacia.

3. Mia gepatra lingvo evoluis grandparte ankaŭ per tio, ke anstataŭ malnovaj, komplikaj, nelogikaj, plumpaj vortesprimoj oni elpensis novajn, pli ekonomiajn (mallongajn), belsonajn, pli precizajn. Kelkfoje tio okazis laŭ oficiala propono al ĉiuj interesatoj. Kompreneble, tio pligrandigas la vortotrezoron, pliampleksigas la vortarojn. Ofte maljunaj homoj eĉ ne komprenas novajn esprimojn, ne scias ilian signifon. Sed la novaj generacioj ilin alproprigas, uzas kaj ne scipovas interkompreniĝi *sen* ili.

Necesas aldoni, ke multaj novaj vortoj estas uzataj kaj enradikiĝas unue al poezio, literaturo, gazetaro kaj nur iom post iom ili trovas vojon ankaŭ al parola uzado. Tamen ne ĉiuj novaj vortoj, proponitaj de poetoj aŭ lingvistoj, enradikiĝas en parola uzado, vasta uzantaro de la lingvo ilin ne ĉiam akceptas. Akceptataj estas nur tiuj novaj vortoj, kiuj estas vere necesaj, mallongaj, simplaj kaj proprecaj al la lingvo.

Similan evoluvojon iras ankaŭ la Internacia Lingvo: aŭtomobilo — aŭto, velocipedo — biciklo, aviadilo — avio, elektronika kalkulmaŝino — komputilo, kamparmastruma kooperativo — kolhozo, ĝardeno de fruktarboj — horto ktp. „Sputniko“, ekuzata en la fino de la 50-aj jaroj post la lanĉo de la unua soveta satelito, ne enradikiĝis, ĉar la vorto ne estas esperanteca kaj ne kapablas konkuri kun „satelito“.

4. Dum la pasintaj jardekoj en la estona lingvo enradikiĝis ankaŭ kelkaj novaj gramatikaĵoj farintaj la lingvon pli elasta, belsona kaj esprimkapabla. Enradikiĝo de novaj gramatikaĵoj tamen estis pli malofta, multe pli malrapida ol enradikiĝo de novaj vortoj. La unua



estonlingva libro aperis en 1525. Sed nuntempe ankaŭ libroj, eldonitaj meze de la pasinta jarcento, estas al la nuna generacio malfacile kompreneblaj, kva-zaŭ mallertaj lingve, malriĉaj je esprimoj. Certe ankaŭ ruso de la XV—XVI jc. apenaŭ komprenus la nunan rusan lingvon, kiel ankaŭ nuntempulo kun malfacilo komprenas la praslavan lingvon. (La unuaj Esperantaj libroj estas plene kaj facile kompreneblaj al nuntempuloj).

Konkludo el tio: la naciaj lingvoj evoluas vortotrezore kaj gramatike. Decidan rolon en la evoluo ludas la kolektiva prudento de la lingvouzantoj — la tuta popolo. Ĉu ni rajtas postuli, ke rilate la Internacian lingvon ne estu tiel same? Kompreneble — ne.

G. G. dolorigas sian koron pri *pureco* kaj *facileco* de la Internacia Lingvo. Cefe pri tio temas la ĉifoja disputo en „Bulgara Esperantisto“.

Sub „pureco“ ni konsideras plej unue internaciecon de la nova lingva elemento, sed ankaŭ ĝian taŭgecon, aplikeblecon al la ĝenerala karaktero de Esperanto. El tiu vidpunkto, ekzemple, la vortoj *restaŭri*, *pikedo*, *kompano*, *konsilio*, *kosmonaŭto*, eĉ *koop* estas internacie konataj kaj laŭ sia karaktero konformaj al Esperanto. Sed la vortoj proponataj kiel *hobio* (ŝatokupo), *eosto* (oriento), *uesto* (okcidento), *est-el* (kiel), *heri* (halti), *fujuo* (ludilo), *rinki* (sonori), *kaputa* (disrompita) kaj multaj aliaj apartenas al tiu kategorio de neologismoj, kontraŭ kiuj G. G. rajte batalas („aĉaĵoj“). Ilia oficiala uzado ne estas dezirinda. Ni esperu, ke la esperantistaro ilin ne akceptos.

Pri la „simpleco“. Ĉu ĝi signifas limigitecon de la vortotrezoro, maldikajn vortarojn de Esperanto? Apenaŭ tio eblas, kiam la vortaroj de la naciaj lingvoj plidikiĝas, kiam la tekniko kaj sciencoj evoluas ĉiam kun plia rapideco. Postuli en tiu situacio, ke la vortotrezoro de la Internacia Lingvo ne kresku, aŭ

ne kresku egalmezure, signifus ĝian lokigon en la lito de Prokrusto, ĝian morton simile al la latina.

La vortotrezoro de kiu ajn lingvo konsistas el du partoj: la baza vortotrezoro (homo, besto, birdo, bona, bela, longa, larĝa, iri, kuri, dormi, manĝi ktp) kaj la fakaj vortoj (sciencaj kaj teknikaj laŭ fakoj). La bazan vortotrezoron, kiu ŝanĝiĝas malmulte, uzas ĉiuj homoj, sed ankaŭ ne egalmeniere: tiuj homoj, kies rondo de intereso estas malvasta, bezonas malpli da vortoj (kelkcent ĝis kelkmi), sed tiuj personoj, kiuj interesiĝas pri literaturo, arto, sporto, muziko, turismo, naturo, bezonas pli multe da vortoj (dek mil aŭ eĉ pli). Fakvortojn devas ellerni nur fakuloj laŭ sia profesio (fako), ilin ne bezonas ĉiuj homoj, kvankam ni povas konstati penetradon de pli kaj pli granda kvanto de fakvortoj en la ĉiutagan vivon.

Tiel same statas la afero ankaŭ rilate Esperanton. Estas ĝenerale konata afero, ke multaj „esperantistoj“ konas malpli ol mil esperantajn radikojn kaj nur kelkajn afiksojn. Ne estas laŭ iliaj kapabloj eĉ ellerni la Zamenhofan minimumon. Ĉu ni konsideru ilin kiel mezurilon kaj akomodu la lingvon laŭ ili? Povas esti nur unu respondo: ne.

La tekniko kaj scienco evoluas. Jam nun la plejmulto de la homaro ne kapablas sekvi egale tiun evoluon. Ĉu tio signifas, ke ni bremsu la evoluon kaj atendu, kiam ĉiuj kapablos kunpaŝi kun la evoluo? Respondo povas esti nur unu: ne.

G. G. eraras, vidante la simplecon de Esperanto en limigita vortotrezoro, kio efektive estus malriĉeco de la lingvo. La simpleco de Esperanto estas en ĝia logikeco, senescepta gramatiko, internacieco de ĝiaj elementoj kaj vortoradikoj.

G. G. pravas: ni ankoraŭ ne eluzis ĉiujn *internajn* evoluezervojn de la Internacia Lingvo, kvankam dum la lastaj jardekoj Esperanto grandparte evoluis kaj pliriĉiĝis ĝuste el ĉi tiu

fonto (novaj vortokombinaĵoj, ellaso de superfluaĵoj sufixoj aŭ infiksoj, pli lerta manipulado de afiksoj). Grandajn meritojn tiusence, kompreneble, havas ankaŭ PIV.

Kiu devas reguligi la evoluon de la Internacia Lingvo?

G. G. proponas „bojkoti (ne abonigi) E-revuojn, kiuj amase uzadas tiujn aĉaĵojn“. Sed kiujn revuojn konkrete?

Al la Akademio de Esperanto li proponas „malpermesi uzadon de senbezonaĵoj centprocentaj sinonimoj“. Sed kiamaniere ĝi malpermesu, se lingvouzantoj volas ilin uzi, se ili estas necesaj? Ja nur la lingvouzantoj mem povas elekti, kiun vorton uzi, kiun ne. Sekve la esperantistoj, la lingvouzantoj mem estas la ĉefaj roluloj en la evoluigo de sia komuna lingvo. Permesi aŭ malpermesi al ili apenaŭ iu estas kapabla.

Tamen dezirinde estus, ke la Akademio pli aktive ol ĝis nun partoprenu la evoluprocezon. Ekzemple: jam dum jardekoj la vortaristoj proponas mulatjn,

paralelajn vortoformojn (apreci — aprezi, aria — arja, kulminacio — kulmino — kulmo, procezo — proceso ktp), embarasigante per tio la uzantojn de la vortaroj, kaŭzante konfuzon en la lingvouzado. Kial la Akademio ne proponu la plej racian, simplan kaj „puran“ formon, kiun ekuzu ĉiuj vortaristoj? Niaj ĉefaj revuoj volonte aperigas la proponojn de la Akademio. Pere de ili niaj vortaristoj kaj redaktoroj, sed ankaŭ la plejmulto de la aktiva esperantistaro, estus bone informitaj, kaj la evoluo de la Internacia Lingvo havus pli certajn reĵojn. Al la vortaristoj mi proponus — turni sin al la Akademio kaj peti ĝian konsilon rilate sinonimojn kaj novajn enkondukotajn vortojn.

La Internacia Lingvo devas esti esprimriĉa, belsona, kapabla esprimi ĉiujn bezonojn de la nuntempa homo — pri ĝeneralaj ĉiutagaĵoj aŭ faka agado. Ni ne bremsu la evoluon, sed reguligu kaj direktu ĝin.

Jar OJALO, Estonio, USSR

Patrol-konkurso 1975

La internacia literatura konkurso sub la aŭspicio de la Itala Literatura Rondo „La Patrolo“ en Novara atingis sian kvinan jaron.

En 1975 j. estis akceptitaj 29 konkursaĵoj de 26 geverkistoj el 12 landoj. Jen la premioj:

Originala poezio

- 1-a. „Malabsolvo“ de Aldo da Giorgi — Italio
- 2-a. „Libro de l'arbaro“ de Elvira Lippe — Latvia SSR
- 2-a. „Eble“ de Lina Gabrielli — Italio
- 3-a. „Montdesegno en blanka memoro“ de Kjell Walraamen — Norvegio

Originala prozo

- 1-a. „Li nepre klarigadis la rilatan kialon“ de Alfredo Pirandello — Italio
- 2-a. „Vizito al milita aerhaveno“ de Alberto Busato — Italio
- 3-a. „Kosma konversecio“ da Ljuba Ĵekova — Bulgario.

La oficiala premiado okazis dum la 46-a Itala Esperanto-Kongreso en Trieste la 16-an de septembro 1975.

ESPERANTO-TURISMO

● En preparo estas Esperanto-turisma kalendaro 1976. Ĝi aperos je la komenco de 1976. En ĝi estos abundaj materialoj pri turismaj aranĝoj, kiuj aplikas Esperanton, informoj pri Monda Turismo, pri la kampanjo „Esperanto en turismo“ k. a. La membroj de Monda Turismo ricevos senpage la kalendaron.

● Monda Turismo simpligis sian membro-sistemon. Individua membro povas esti ĉiu fakdelegito de UEA pri turismo aŭ alia aktivulo en Esperanto-turismo, kiu skribu aliĝis. Subtenantoj estas tiuj, kiuj minimume unufoje finance aŭ materiale subtenis la Asocion, kaj kolektivaj estas la membroj de organizaĵoj, kiuj subskribis interkonsenton pri kunlaboro kun la Asocio.

Subtenantoj, kiuj donis minimume 5 US-dolarojn aŭ bulgarajn levojn, ricevas la bultenon „Turismo per Esperanto“.

● Monda Turismo aranĝas du konstantajn migrantajn ekspoziciojn, kiuj periode estos renovigataj per aktualaj materialoj: prospektoj kaj broŝuroj pri turismo en Esperanto kaj



karikaturaj pri turismo aperintaj en gazetoj, ĵurnaloj kaj revuoj. Jam sendis karikaturojn aŭ prospektojn personoj el: Bulgario, Hungario, Sovetunio, Italio kaj Francio.

● Monda Turismo en kunlaboro kun vojaĝ-oficejoj okazigos en majo 1976 en Sofio unusemajnan vesperan kurson por ĉiĉeronoj kaj turismaj pilotoj. La kurson rajtas partopreni ĉiu persono, kiu scipovas Esperanton kaj plenigis specialan petskribon kaj formularon. La finintoj de la kurso ricevos atestilon. Pliajn informojn sendas Monda Turismo, P. K. 45, 1000 Sofia, Bulgario.

● „Intergast“ — la loĝiga servo de Monda Turismo — kaj „Pasporta Servo“ de TEJO integriĝis. En la komenco de 1976 aperos broŝuro kun adresoj de loĝigantaj personoj de ambaŭ servoj. La gastigantoj ricevos senpage la broŝuron. Detalajn informojn sendas Monda Turismo.

Monda Turismo komisiis al fakulo verki gvidlibron por ĉiĉeronoj. Tiaspeca libro ĝis

nun ne estas eldonita ankaŭ en naciaj lingvoj.

● Bulgara Esperanto-Kooperativo vendas metalajn insignojn de Monda Turismo. La insignon oni povas akiri ankaŭ pere de la libro-servo de Monda Turismo.

● Lastatempe en Bulgario kaj precipe en Sofio venas individue aŭ grupe multe da esperantistoj. Por ke ni loĝigu ilin ĉe esperantistoj, estas petataj ĉiuj bulgaraj esperantistoj, kiuj akceptas gastojn en siaj loĝejoj pere de „Balkanturist“, „Orbita“, „Koopturist“ aŭ „Pirin“ aŭ deziras fari tion, sin anoncu al Monda Turismo, P. K. 45, 1000 Sofia, Bulgario.

● Dank' al financa subteno de la esperantistaro fariĝis ebla presigo de kolora varbafiŝo kun desegnaĵo kaj la frazo „Viaj ferioj estos pli belaj per Esperanto“. La frazo aperos en kelkaj lingvoj.

● La bulteno de Monda Turismo „Turismo per Esperanto“ aperas laŭbezzone, sed minimume 6 foje en la jaro.

VERDAJ STELETOJ

van Vazov

EKZILITOJ

En dezert' malbonaŭgura,
klam foje mi promenis,
el kaverna tru' terura
ĝemsopiroj al mi venis.

Justo, Vero kaj Honesto —
tri fratinoj mildaj, belaj,
ne estis en aresto
en profundoj plej malhelaj.

„Vi al urbo ne reiris,
kie oni vin estimas?“
Ili, kompatindaj, diris:
„Ni ekzilon novan timas!“

El la bulgara: Simeon M. Simeonov

La Spirito de l'Malbono
ĉiujn tri enkatenigis,
sed el ĉenoj de l'demono
tuj mi ilin liberigis. . .

Post tri tagoj, reveninte,
saman lokon mi vizitis.
La fratinoj enrestinte
tie sidis kaj hezitis!

NI ESTAS KUNE KUN LA HISPANA POPOLO!

La anoj de la Klubo de Internacia Amikeco ĉe la okklasa lernejo de Ziemiŝ sekvas atente la eventojn en la mondo. Matene la 2-an de oktobro ili zumis simile al abelsvarmo: „Ĉu vi aŭdis, ke oni anoncis la hodiaŭan tagon kiel tagon de la kontraŭfaŝisma batalo en la mondo?“

La aktivuloj de la klubo „Fairero“ decidis senhezite aranĝi protestan mitingon kontraŭ la krimoj de la reĝimo de Franko en Hispanio. Por loko de la mitingo oni elektis Delinkalns (la plej alta monto en la ĉirkaŭaĵo de

Ziemiŝ). Laŭ diversaj vojdirektoj tien vojaĝis pioniroj, ĵunkomunistoj. La infanoj kunportis ruĝajn taĉmentiflagetojn kun la silueto de V. I. Lenin, la verdan standardon kun la paca stelo meze, porteblajn afiŝojn.

Estis ordono krei dumvoje novan batalvokon, ellerni ĝin. Por fari sukcese tion oni devis rememori ĉion, kio estas sciata pri la malproksima lando Hispanio. La infanoj rememoras la priskribitan en la rakontkolektoj de Janis Griva (latva verkisto-esperantisto, volontulo en la hispana civila milito) humor-

riĉan, spritan kaj saĝan hispanan popolon, preparolis ĝiajn profesojn, kutimojn. Oni rekonis kiel la plej aktualan la batalvokon de la pionira taĉmento de la 6-a klaso, gvidata de Agnis Srudra.

Sur Delinkalns flamis la pionira lignofajro. Ĉirkaŭe videbliĝis la kolora panoramo de la hejma regiono. Nur la ekscitplenaj vortoj de la pioniroj kaj junkomunistoj akordis kun la aŭtune trankvila naturo.

La prezidantino de la Klubo de Internacia Amikeco „Fajrero“ Guna Buka rakontis al la infanoj, ke antaŭ nelonge, kiam la progresema homaro festis la 30-an datrevenon de la venko kontraŭ la faŝismo, ŝi kaj aliaj malgrandaj Ziemeri-anoj ricevis el la hispana urbo Barcelono medalojn kaj diplomojn de venkintoj en la konkurso de infandeseĝnaĵoj „Por amikeco, paco kaj solidareco“. La mortpuno de la kvin junaj hispanaj antifaŝistoj atestas la ignoradon de la homaj rajtoj en tiu lando.

En la mitingo parolis la pionirinoj Ilona Kalnina, Baiba Pavloviĉa, Marite Repule. La

vicsekretario de la junkomunista primara organizaĵo Elita Rimša legis la rezolucion de la partoprenantoj en la mitingo:

„Ekscitante pri la nova krimo de la reĝimo de Franko en Hispanio — pri la mortpuno de kvin antifaŝistoj — ni aliĝas al la protesto de la laborularo de Sovetunio kontraŭ la perfortaj agoj fare de la frankistoj kontraŭ la loĝantaron de Hispanio kaj ni postulas liberecon kaj restarigon al la demokratiaj rajtoj por la hispana popolo!“

Ni decidis sendi fotojn kaj esperantlingvan priskribon de la mitingo al la amikoj en Hispanio.

I. Vigrieze

Kolektive tradukis: E-rondeto „Fajrero“, distrikto Aluksne, ternejo Ziemeri 228 732 MARINKALNS, Latvio, USSR

El. j. „Oktobra Karogs“ (Oktobra Standardo), 4. X. 1975

FORPISIS IVAN CANEV

Naskita en 1903 en v. Samovodene, distrikto de Veliko Târnovo, en multinfana familio de agrikulturisto, Ivan Canev en la



gimnazio de Târnovo arde brakumis la liberigan socialisman ideon kaj sindone batajnis kaj laboris por ĝia triumfo dum sia tuta vivo.

Fininte la gimnazion li vane serĉis laboron en sia naskiĝvilaĝo — la reakciaj regantoj malamis lin. Tial li, kiel multaj aliaj progresemaj junuloj, iris al la Rodopi-montaro kaj tie ricevis lokon de instruisto. Post naŭ jaroj li fariĝis oficisto kaj tia emeritiĝis.

Esperanton Ĉe ĉe lernis en la printempo

de 1923 kaj jam la aŭtunon de la sama jaro ekgvidis E-kursojn kaj komencis viglan korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj. Aparte notindaj estas liaj ligoj kun sovetaj esperantistoj. Samtempe li abonis la periodaĵojn de la progresema tiam laborista E-movado „Sennaciulo“ kaj „Sennacieca Revuo“, en kiuj aperis liaj artikoloj kaj korespondadoj kontraŭ la sanga faŝisma teroro de Aleksandr Cankov en Bulgario, konigante al la mondo la tragedion de la bulgara laborpopolo sub la monarko-faŝisma diktaturo.

Post sia emeritiĝo Canev dediĉis sin plene al Esperanto. Li multjare estis membro de la estaro de la Sofia E-Societo „Maksim Gorkij“, sekretario de la bulgara sekcio de MEM ktp. Dum la lastaj sep jaroj Canev laboris kiel kasisto de la Internaciaj E-Kursoj por Instruistoj kaj multe kontribuis por ties stabiliĝo kaj progreso.

Ivan Canev gvidis multajn E-kursojn, prelegis pri lingvaj kaj sociaj demandoj. Kiel vera internaciisto, li multe laboris helpe al la vjetnama popolo en ĝia justa batalo kontraŭ la usonaj imperiistoj por libero kaj nacia sendependeco. Li kolektis monon, disvastigis la eldonaĵojn de la Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio ktp. Canev ricevis la honoran insignon de MEM.

Pro sia aktiva kaj valora E-laboro li estis honorita ankaŭ per la ora insigno de BEA.

Ĉiam senriproĉa, honesta, ege laborema, modesta, akurata, fidela kaj sindona al Esperanto — tia restos Ivan Canev, en la memoro de ĉiuj, kiuj lin konis. Li lasis por ĉiuj helan ekzemplon.



La bulgara gazetaro pri Esperanto kaj la Esperanto-movado

Ĵ. „Oteĉestven Front“ — Sofia (9. I. 1975) — artikolo „Lingvo de la amikeco“ de Angel Tanev el Karlovo.

En la sama ĵurnalo:

19. V. ampleksa reportaĵo de Radko Trifonov pri la E-spektakloj de la Ŝtata Pupteatro de Plovdiv en Danlando.

23. IX. informo pri la plenkunsido de CK de BEA, okazinta la 22-an de septembro.

Ĵ. „Oteĉestven Zov“ — Vraca (14. II. 1975) — informo pri la agado de la loka lernejana E-Societo „Verda Raketo“.

En la sama ĵurnalo (4. III): du informoj de L. Trifonovski kaj K. Kongova pri la labro de la klubo „Esperanto“ ĉe la Junpionira Domo.

„Vitoŝa“ (ĵurnalo de uzino „Vitoŝa“ en Sofio — 26. II): informo de P. Popnikolov „Esperanto eniris nian uzinon“.

Ĵ. „Septemvri“ — Stara Zagora (13. III): „Duonjarcento de la E-societo en u. Ĉirpan“ — artikolo de Ivan Peev.

Ĵ. „Dunavska Pravda“ — Ruse (25. III): „Renkontiĝo de la esperantistoj el Norda Bulgario“ — informo de T. Radeva;

En la sama ĵurnalo (18. VI): „La lernejoj kaj la Internacia lingvo Esperanto“ — ampleksa artikolo de Stefan Popov.

Ĵ. „Zarja na Komunizma“ — Loveĉ (3. IV): „La agado de la esperantistoj kaj „Faktoj el la internacia korespondado“ — artikoloj de Ilija Ivanov.

En la sama ĵurnalo (21. X): informo „Kurso de Esperanto“ de Il. Ivanov.

Ĵ. „Ŝumenska Zarja“ — Ŝumen (22. IV): „La esperantistoj kaj la batalo por paco“ — informo de Georgi Kostadinov.

En la sama ĵurnalo:

13. V. ampleksa artikolo de Cviatko Todorov „Lingvo de paco kaj interkompreniĝo“ lige kun la 70-jara jubileo de E-Societo „Veĝiĝo“ en Ŝumen;

7. X: „Solidaj amikaj rilatoj“ — artikolo de Cv. Todorov pri la ligoj de la lokaj esperantistoj kun esperantistoj el GDR.

Ĵ. „Balkansko Zname“, Gabrovo (15. VII): „Vespero de la E-leteroj“ — informo de ing. Ivan Petrov.

Ĵ. „Pravna Tribuna“ — Sofia (12. VI): informo pri la agado de la Jurista E-Sekcio de Genĉo Genĉev.



La E-mitingo en Ziemeŝi (paĝo 15)
Foto: A. Kubulnieks

Ĵ. „Rodopski Ustrem“ — Smoljan (26. VII): „Esperanto en servo de la paco“ — informo de Varvara Ĉipilova.

En la sama ĵurnalo:

2. VIII. „Amikoj de Esperanto, amikoj de la monto“ — ampleksa raportaĵo de Maria Diĉeva pri la Internacia E-Lernejo en Pisarnica;

23. IX: „En la montaro de Orfeo“ — raportaĵo de Maria Vasileva pri la aŭtuna E-Ferio en Pamporovo.

Ĵ. „Veĉerni Novini“ — Sofia (21. VIII): informo de la Telegrafa Agentejo pri la Internaciaj E-Kursoj en Burgas.

Ĵ. „Ĉernomorski Front“ — u. Burgas (22. VIII): „Internacia somera universitato“ — raportaĵo de Lasto Nikov pri la Internaciaj E-Kursoj en Burgas.

Ĵ. „Literaturen Front“ — Sofia (11. X): „Instruisto de etuloj kaj plenaĝuloj“ — ampleksa artikolo de poeto Andrej Germanov pri Dimitr Zlatarski — elstara kulturaganto kaj E-poeto.

Ĵ. „Zemedelsko Zname“ — Sofia (23. IX): informo pri la plenkunsido de CK de BEA je la 22 de septembro.

Ĵ. „Kom“ — u. Berkovica (15. IX): „Kursoj de Esperanto“ — informo de D. Zlatarska.

Ĵ. „Ĥaskovska Tribuna“ — u. Ĥaskovo (3. IX): „Batalantoj por paco kaj internacia amikeco“ — ampleksa artikolo de Georgi Idakiev pri la agado de la loka E-societo.

Redakta Komitato: Kunĉo VÂLEV (ĉefredaktoro), Nevenka ALEKSIEVA, Marin BÂCEV, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Stefka HRISTOVA, Nenko JONKOV, Krâstju KARACIN, Haim LEVI.

Administra sekretario kaj korektanto: Minko CONKOVSKI

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

Bulgario :

Bogdana Lambeva — bul. Lenin 83, vîhod 1, ap. 11, 6600 *Kârĝali* (20-jara fotografino — kun ĉi pri ĉt)

Mikerem Hamzova — Zadbolniĉen kvartal 18, 6600 *Kârĝali* (21-jara flegistino — kun ĉi pri ĉt).

GDR

Schulz Reinhard — 943 *Schwarzenberg*, D-ro Otto Nuschkestr. 2 (28-jara inĝeniero)

Kolombio, S/Ameriko :

Luis Fernando Martinez Solis, kesto aerpoŝta 6950, *Medellin* 1 (Apartado Aéreo)

Pollando

Teresa Kowalec — 85-324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9/122 (21-jara — kun gejunuloj)

Elzbieta Lesniewicz — 85-324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9/113 (22-jara — kun gejunuloj)

Krojniewski Stanislaw — 85-324 *Bydgoszcz*, ul. Koszarowa 9a/319 (23-jara — kun fraŭlinoj pri turismo, sporto, mekaniko)

Jozef Myrda — 30-091 *Krakow*, ul. Bronowicka 81/73 (28-jara fraŭlo — pri turismo, foto, folkloro k. a.)

Jozef Rogowski — 40-584 *Katowice*, str. Brynawska 62 m 5 (34-jara — pri E-movado; interŝanĝas esperantaĵojn kaj E-insignojn kun ĉi)

Marian Grzeszczyk — 43-146 *Chelm Slaski*, str. Stawowa 28 (kolektas bk).

Stanislaw Kowalczyk — *Tarnowskie Góry*, str. Zamkowa 7 m 13 (inĝeniero — pri Esperanto)

Anna Nowak — 40-082 *Katowice*, str. Sobieskiego 12/19 (studentino — pri Esperanto)

Danuta Swidzinska — 42-580 *Wojkowice*, str. Swierczewskiego 21, woj. Katowice (bk, esperantaĵoj).

Donata Zembala — *Sosnowiec*, str. Kacza 13, woj. Katowice (kolektas bk)

Edward Kozlowski — *Katowice*, str. Slowackiego 10/9 (inĝeniero, kolektas esperantaĵojn)

Jan Sadowski — str. Swierczewskiego 6, 42-700 *Lublinec*, woj. Katowice (pri ĉt kun ĉi)

D-ro Zygmunt Moskwa — ul. Pastrowskiego 1, 45-049 *Opole* (43-jara kuracisto — turismo, literaturo, muziko, bk, magnetofonaj kasetoj, diapozitivoj)

Sylvie Prazmowska — 34-500 *Zakopane*, ul. Kosciuszki 18, PLSP „Antonio Kenar” 18-jara — kun gebulgaroj — pentroarto, (skulptarto, filmoj, sporto, turismo)

Anna Zlotowska — PPR 16-25, 88-100 *Inowrocaw* (23-jara — pri ĉt kun ĉi)

Georgij Suĥno — 40-073 *Katowice*, str. Strelecka 2/14 (ŝakludo perletere)

Maryla Czopek — *Krakow*, str. Limanowskiego 16/9 (kun ĉi — literaturo, muziko, sporto, turismo, pm, bk, mod-revuoj, gram. diskaj)

Jolanta Seweryn — *Strzemieszyce* 42-530, ul. Główna 156 (kun gebulgaroj — muziko, teatro, kino)

Alicja Gregorczyk — ul. 3 Marca 43/3, 78-300 *Swidwin* (lernantino en liceo — pri Esperanto, muziko, turismo)

Antoni Myszakowski — 55-470 *Olesnica*, str. M. Curie — Sklodowskiej 5-b/4 (31-jara juristo — pri ĉt, precipe juro, historio, lingvistiko, interŝanĝo de pm, bk, revuoj)

Teresa Vedziora — Al. Wyzwolenia 75 B/85 71-401 *Szczecin* (arto, literaturo, arkitekturo la nova vivo en Bulgario)

Sovetunio

Uponaite Luise — ul. Alijos 1, *Kurŝenai*, Ŝiauliai, Litovio (18-jara — kun ĉi pri ĉt, bk, kalendaroj, floroj)

Kudinova N. — 295 000 *Lvov*, glavpoĉtamt a/j 108 (kun ĉi — pri lingvoj, aparte pri vortaroj, gram. diskaj, joga literaturo k. a.)

Fedjukina Galina V. — 340 065 *Doneck* 66, poĉtamt, do vstrebovanija (studentino — pri ĉt kun ĉi)

Adelė Jankauskaite — Kaŝtonu 12, *Plunge* 235 640 Litovio (17-jara — poezio, muziko, lingvoj)

Du oficistinoj, 19-jaraj, dez. korespondi kun esperantistoj el socialismaj landoj:

Elma Klimantaite kaj Jurate Juknaite — Litovio, *Mazeikiai* 235 500, Komresoriu Gamykia, Ekaiĉiavimo centras.

Tri mekanikistoj — 20-22-jaraj, dez. korespondi kun geesperantistoj el socialismaj landoj. La nomoj: Neikaŭskas St., Bužokas Konst. kaj Breive A. Komuna adreso: Litovio, *Mazeikiai* 235 500, Sporto 3—1

Brigitta Rudjinska — str. Brivibas 96-1, *Liepaja*, Litovio (16-jara — kino, muziko, turismo, bk)

Tiia Urbla — *Tallina* 200 013, Kotka 10-46, Estonio (21-jara fraŭlino — kun ĉi pri ĉt)

Erge Otsa — *Tallina* 200 012, Pedaja 24, Estonio (20-jara fraŭlino — kun ĉi pri ĉt)

Slamaite Alma — Jankimo 5, 234 150 *Molėtai*, Litovio (17-jara lernantino — kun gejunuloj el ĉi)

Daina Kiške — Zirnu 133, *Liepaja* 229 701 Latvio (22-jara — kun ĉi pri turismo, sporto, arto, gram. diskaj)

Bilik Margarita — *Perm* 61 400, ul. Komunističeskaja 11/a, kv. 7 (oficistino — kun ĉi pri ĉt)